

VI ESTAS PETRO, MI DONOS AL VI LA ŜLOSILOJN DE LA REGNO DE LA ĈIELO – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Mateo 16,13-20

Kiam Jesuo venis en la regionon de Cezarea Filipi, Li demandis siajn disĉiplojn: "Kiu, diras la homoj, ke la Filo de la homo estas?". Ili respondis: "Iuj diras, ke Li estas Johano, la Baptisto, aliaj, ke Li estas Elija aŭ Jeremia, aŭ iu alia el la profetoj". Jesuo demandis plue: "Sed vi, kion vi diras? Kiu mi estas?". Simon Petro respondis: "Vi estas la Mesio, la Filo de la vivanta Dio". Tiam Jesuo diris al li: "Beata vi estas, Simon Bar-Jona, ĉar nek karno, nek sango instruis vin, sed mia Patro, kiu estas en la ĉielo. Kaj Mi diras al vi, ke vi estas Petro, la Roko, kaj sur tiu roko Mi konstruos mian Eklezion, kaj la pordegoj de la infero ne venkos ĝin. Mi donos al vi la ŝlosilojn de la regno de la ĉielo: kion ajn vi ligoj sur la tero, tio estos ligita en la ĉielo; kaj kion vi malligos sur la tero, tio estos malligita en la ĉielo". Tiam Li admonis la disĉiplojn, ke al neniu ili diru, ke Li estas la Mesio.

Por teni fore siajn disĉiplojn de la fermento de la fariseoj, tio estas de la doktrino de la fariseoj kaj de la sadukeoj, Jesuo ilin portas for de la juda religia institucio kaj ilin kondukas al la ekstrema nordo de la lando. Tio estas kion skribas Mateo, en ĉapitro 16, versikloj 13-20.

"Kiam Jesuo venis en la regionon de Cezarea Filipi", Cezarea Filipi estas la ekstrema nordo de la lando, estas la urbo konstruita de unu el la

filoj de Herodo la Granda, Filipino, kaj, por ĝin distingi disde la alia ĉemara Cezarea, ĝi estis nomata Cezarea Filipi.

En la epoko de Jesuo la urbo estis konstruata. Tiu estas detalo memorenda, apud la urbo troviĝis unu el la tri fontoj de rivero Jordano, kiu estis ankaŭ konsiderata la enirejo de la regno de la mortintoj. Tiuj estas do elementoj memorendaj por kompreni tion kion la evangeliisto rakontas al ni.

Do Jesuo kondukas siajn disĉiplojn tiel for de Judeo kaj ankaŭ de Galileo por starigi al ili demandon: "*Li demandis siajn disĉiplojn: „Kiu, diras la homoj, ke la Filo de la homo estas?”*". La evangeliisto kontraŭmetas la homojn al la Filo de la homo, la homo kiu havas la dian kondiĉon, la homo do kiu havas la spiriton kaj tiuj kiuj ne ĝin havas.

Jesuo volas kompreni kiu estis la efiko de la predikado de la disĉiploj kiujn li dissendis anonci la novaĵon de la regno. La respondo estas elreviga: "*Ili respondis: „Iuj diras, ke Li estas Johano, la Baptisto”* ĉar oni kredis ke la martiroj estus tuj releviĝintaj, "*aliaj, ke Li estas Elija*". Elija, laŭ la tradicio, ne mortis, sed estis nur forrabita al la ĉielo kaj li estus revenonta ĉe la alveno de la estonta mesio.

"*Aliaj Jeremia*", ĉiam laŭ la tradicio li forsaviĝis de klopodo de ŝtonmortigo, "*aŭ iu alia el la profetoj.*". Oni atendadis unu el la profetoj anoncita de Moseo, ĉiukaze ĉiuj personecoj kiuj rilatas la antikvon. Neniu, nek la disĉiploj nek la personoj al kiuj ili sin adresis, komprenis la novaĵon portitan de Jesuo.

Tiam Jesuo diras: "*Sed vi*" do li sin adresas al la tuta grupo, "*kion vi diras? Kiu mi estas?*". Jesuo sin adresis al la tuta grupo de la disĉiploj, sed estas nur unu kiu prenas la iniciativon. "*Simon Petro respondis*" Simono estas la nomo, Petro la negativa kromnomo kiu indikas lian obstinecon, kaj kiam la evangeliisto lin prezentas per tiu kromnomo, tio signifas ke estas io kontraŭa al la anonco de Jesuo.

"*Simon Petro respondis: "Vi estas la Mesio, la Filo de la vivanta Dio"*. Finfine estas iu el la disĉiploj kiu komprenis ke Jesuo ne estas la filo de David, tiu kiu per la perforto trudis sian regnon, sed li estas la filo de Dio (laŭvorte) viviganta, tio estas ke li komunikas vivon. "*Tiam Jesuo diris al li: "Beata vi estas, Simon Bar-Jona"*. Kial beata? Petro estas la korpurulo, kaj do li povas vidi Dion.

Li diras al li "beata", tamen lin vokas "*filo de Jona*". "Filo" en la hebrea kulturo ne indikas nur tiun kiu naskiĝis de iu, sed tiu kiu al li similas pro konduto. Kaj Jesuo lin vokas "filo de Jona". Jona estas la ununura inter la

profetoj de la Malnova Testamento kiu faris ekzakte la kontraŭon de tio kion la Sinjoro ordonis al li. Fakte la Sinjoro estis al li dirinta: "Jona, iru al Ninivo predikadi la konvertiĝon aliel mi ĝin detruos" kaj Jona faris la malon.

Anstataŭ iri orienten, li enŝipiĝis kaj sin direktis okcidenten. Poste, fine Jona konvertiĝis. En tiu filo de Jona do Jesuo bildigas Petron: li faros ĉiam la kontraŭon de tio kion Jesuo petos al li fari, sed poste je la fino li konvertiĝos.

"*Ĉar nek karno, nek sango instruis vin, sed mia Patro, kiu estas en la ĉielo*". Jen Petro estas la beata ĉar li estas la korpurulo kiu povas vidi Dion. "*Kaj Mi diras al vi, ke vi estas Petro*", la greka vorto utiligata de la evangeliisto estas *Petros*, kiu indikas brikon, ŝtonon, kiu povas esti prenata kaj uzata por iu konstruaĵo. "*Kaj sur tiu roko*". *Petra* ne estas la ina formo de Petro. La evangeliisto utiligas la grekan terminon *Petra* kiu indikas la rokon kiu estas taŭga por konstruadi. Ĝi estas la sama vorto kiun Jesuo, en ĉapitro 7, elektis por la domo konstruita sur la roko.

Jesuo do diras al Simono: "Vi estas briko. Sur tiu ĉi roko" kaj la roko estas Jesuo, "*Mi konstruos mian Eklezion*". La greka vorto *ecclesia* havas nenion kulta, sed ĝi estas profana vorto kiu indikas la kolektiĝon, la kunvenon de tiuj kiuj estas kunvokataj. Jesuo do ne venas por konstrui novan sinagogon, sed novan realaĵon kiu ne havas religiajn karakterojn, kaj pro tio li utiligas tiun laikan vorton.

"*Kaj la pordegoj*"; la pordegoj de iu urbo indikas ĝian forton, ĝian potencon. "*De la infero*", tio estas de la regno de la mortintoj. Mi memorigas ke la sceno disvolviĝas apud unu el la grotoj kiujn oni pensis esti la enirejo al la regno de la mortintoj," *ne venkos ĝin.*"

Kiam iu komunumo estas konstruita sur Jesuo, la filo de la vivanta Dio, do vivo komuniĝas, la negativaj fortoj, la fortoj de la morto, havos nenian povon.

"*Al vi mi donos la ŝlosilojn de la regno de la ĉielo*". Disponigi la ŝlosilojn al iu signifas taksu tiun respondeca pri la sekureco de tiuj kiuj estis ene. Ni diris aliajn fojojn ke la regno de la ĉielo en la evangelio de Mateo ne signifas iun regnon en la ĉielo, sed ĝi estas la regno de Dio. Jesuo do ne donas al Petro la ŝlosilojn por la eniro en la transmondon, ne donas al li la taskon malfermi kaj fermi, sed taksas lin respondeca pri tiuj kiuj troviĝas ene de tiu regno, kiu estas la alternativo kiun Jesuo venis proponi.

"Kion ajn vi ligos sur la tero", ĉi tie la evangeliisto utiligas rabenan lingvaĵon, kio signifas deklari aŭtenta aŭ ne iun doktrinon, "tio estas ligita en la ĉielo", tio estas en Dio, "kaj kion vi malligos sur la tero, tio estas malligita en la ĉielo". Tio kion Jesuo nun diras al Petro sekve pli poste en ĉapitro 18, li diros al ĉiuj disĉiploj.

La lastaj vortoj, kiujn Jesuo utiligas en tiu ĉi evangelio reprezentas la sendadon de la disĉiploj iri kaj instrui "ĉion kion mi ordonis al vi". Do en la instruado de Jesuo, tiu mesaĝo komunikas la vivon, estas dia aprobo, flanke de la ĉielo. Tamen, jen la surprizo: *"Tiam Li admonis la disĉiplojn, ke al neniu ili diru, ke Li estas la Mesio"*.

Kiam Jesuo ordonas, tio signifas ke estas ia rezisto. En la respondo de Petro estis iu pozitiva parto pro la fakto ke li rekonis Jesuon kiel la filon de Dio kiu komunikadis vivon, la vivanta Dio, sed la negativa parto kiu estas? La personoj diris ke vi estas la Kristo, tio estas la mesio atendata de la tradicio. Tiam Jesuo diras: "tion al neniu diru", ĉar li ne estas la mesio atendata de la tradicio.

Jesuo estas Kristo, li estas la mesio, sed en formo tute malsama, li ne utiligos la povon, sed la amon; ne la ordonon sed la servadon. Kaj tio kaŭzos nun la kolizion ĝuste kun Simono. Tiu kiu estis difinita "ŝtono" por konstruado, iĝos ŝtono de falpuŝiĝo.